1 8 -11- 1988

# Informilo

Monata revuo
Maandelijks tijdschrift

8a jarkolekto n-ro 7
oktobro 1988

**Informilo**, kadro-revuo de Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen. - Jarabono: 150 BEF - Kontoj: 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43 - Respondeca eldonanto (*verantwoordelijke uitgever*): Monique Caestecker, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge.

ESTRARO

Ivo Durwael, prezidanto, Paul Gilsonlaan 5, 2520 Edegem, tlf. (03) 440 30 92.
Edward Symoens, vicprez., Putsesteenweg 131 A, 2180 Kalmthout, tlf. (03) 666 62 66.
Monique Caestecker, sekretario, Kerkstraat 66, 9940 Sleidinge, tlf. (091) 57 63 84.
Jan Bovendeerd, konsilanto, Meidoorn 42/2, 2510 Mortsel, tlf. (03) 449 50 06.
Roland Rotsaert, financoj, Visspaanstraat 97, 8000 Brugge, tlf. (050) 33 00 04.
Alex Humet, instruado, Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem, tlf. (03) 239 21 69.
Hilde van Ingelgem, grupa agado, Arbeidsstraat 21, 9300 Aalst, tlf. (053) 70 50 11.
Jos Vandebergh, Ambachtstraat 39, 3538 Houthalen, tlf. (011) 52 19 43.

KOMISIONOJ

**Financoj**: Roland Rotsaert, Ivo Durwael kaj Paul Peeraerts.
**Eldona agado**: Chris Declerck, Amerikalei 135/2, 2000 Antwerpen, Alex Humet kaj Paul Peeraerts.
**Manlibro de la aktivulo**: Marc Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, 3030 Heverlee, tlf. (016) 20 14 53.
**Gazetara servo**: Herman Deceuninck, Villalaan 1 b 4, 1500 Halle, tlf. (02) 360 17 22.
**Rebata servo**: Germain Pirlot, Kemmelbergstraat 5/3, 8400 Oostende, tlf. (059) 70 87 00.
**Instruado**: Petro de Smedt, Hemelstraat 44, 9330 Dendermonde, tlf. (052) 21 26 77.

## Raporto pri FEL-kunsido de 88.10.08

Partoprenis:

Ivo Durwael, Edegem
Roland Rotsaert, Brugge
Jean-Pierre Allewaert, Kortrijk
Jan-Willem Arnold, Nijmegen
Guido Van Damme, Antwerpen
Gerd Jacques, Antwerpen
Herman Roeland, Marke
Marcel Aerts, Hasselt
Bob Rombaut, Beringen
Edward Symoens, Kalmthout
Renée Oost, Halle
Georges Sossois, Couvin
Jan Bovendeerd, Mortsel
Mireille Storms
Katja Lödör, Gent
Marc Vanden Bempt, Leuven (Heverlee)
Walter Van den Kieboom, Oostende
Paul Peeraerts, Antwerpen
J. Calado, Rotterdam
Alex Humet, Antwerpen
Jean Pierre VandenDaele, Lissewege
Jos Vandebergh, Houthalen
Alfons Beckers, Beringen
Kees Ruig, Nijmegen
Hans Erasmus, Voorburg
Jan Devillé, Halle
Nancy Haegebaert, Evergem
Hilde Van Ingelghem, Aalst
Arpad Lödör, Gent
Raimond Steenhout (BEFA), Ninove

### Enkonduko (ID)

Ekzistas multaj iniciatoj en la E-movado, sed ĉiu grupo emas agi individue. Dum la kunveno ni eltrovu ĉu ekzistas kumunaj celoj, por ke nia agado estu pli sukcesa.

### Unua parto

Gvidis: Hans Erasmus (NL)

Statoficisto ĉe "VROM"-ministerio (Volkshuisvesting, Ruimtelijke Ordening, Milieu). Okupiĝas precipe pri mediprotektado. Havas spertojn kun internaciaj organizoj (i.a. EK).

Antaŭe mediprotektado estis afero de multaj instancoj, sen klara strukturo. Oni petis helpon de profesia konsilisto. Celoj estis pli granda kunordigo kaj rapida traktado de la dosieroj (maksimume 7 monatoj). Jen raporto pri la "tralumigado":

Necesis jam ekde la komenco likvidi ĉiujn problemojn, tiel ke dum la ellaborado de la projekto estas unuanimeco. Oni decidis pri limigita kvanto da mediprotektad-temoj, ĉar evidentiĝis ke entrepreno estas nur sukcesa, se estas klaraj, malmultaj celoj. Tre gravas ankaŭ la postkontrolado.

Post difino de la celoj, oni laboris en 2 direktojn:
- Efikcele: difino de la normoj
- Kialcele: esploro de la kaŭzo de problemoj.



Laborplano post decido pri celoj:

| | | |
|---|---|---|
| - integriĝo | | - planado havu rezultojn rilate al mediprotektado |
| - prioritatoj | | - sistema difino de prioritatoj |
| | ellaboro: | |
| - kunlaboro | | - "totala" agado - celgrupoj |
| - kredindeco | | - kunlaboro inter diversaj ŝtataj instancoj unuflanke, kaj ŝtato-industrio aliflanke |

Krome necesas (kvankam estas malfacile realigebla) internacia kunlaboro: EK, "OESO", UN. La difinitaj celoj validas por la estonteco, sed jam tuj oni faras iujn aranĝojn. Baldaŭ aperos "Milieubeleidsplan".

Kiel tio rilatas al Esperanto ? HE ekkonis la movadon nur antaŭ tri jaroj. Surprizis lin la malordo ĉe la nederlanda movado. Surbaze de liaj antaŭaj profesiaj spertoj, li mendis "tralumigadon" de sendependa fakulo. Dum "simpozio" 30 esperantistoj faris raporton pri fortaj kaj malfortaj eroj de la nederlanda movado. Konkreta ellaboro baldaŭ sekvos.

HE havas ankaŭ "privatan" projekton. Por sukcesigi projekton necesas atenti pri jenaj punktoj:
- Zorga preparado por mobilizi ĉiujn E'-movadojn.
- Tre delikate gvidi la tutan projekton. Unu malforta ĉenero povas malsuksigi la tuton.
- Prepari homojn ĝis ni certas ke ili jesos al niaj demandoj.
- Utiligi evoluojn en la socio. Ekz. nuntempe la EK okupiĝas pri la lingva problemo kaj oni malkovras malaltan rendimenton de la lingvoinstruado.

En 1991 okazu, samtempe en 12 EK-ŝtatoj, televid-elsendo pri la lingvaj problemoj en la EK. Prepare al tio, oni jam en 1990 organizu E-instruadon en lernejoj; tiu instruado estu daŭrigota per televida kurso (ekz. Teleac). Oni ankaŭ organizu kunsidon de la eŭropa junular-parlamento (kiu estas sufiĉe influhava) pri la lingvaj problemoj.

Prepara fazo de la projekto: dum la sekvanta jaro.

### Dua parto

Gvidas: Mirjam Smets kaj Luk Lammens. Ambaŭ studis ĝermanan filologion kaj estas eks-instruistoj. Laboras en asekurokompanio kaj banko. Ili tie respondecas pri formado, komunikado kaj kvalitkontrolo.

Plano: 1 horo: mallonga prezento de la ideoj pri merkatado
posttagmezo: projektoj: analizo, kiel "vendi" Esperanton...)
fino (17a-18a h.): diskuto kun gvidantoj

**Esperanto estas servo.** Jen du difinoj de servo:
- agrablan aŭ malagrablan senton kiun havas la ricevanto de la servo ĉe la liveranto de la servo (malagrabla sento = malreklamo)
- tio, kion vi povas aĉeti aŭ vendi, sed ne povas lasi fali sur vian piedon

ideo de M. Smet!

Ecoj de servo estas:
- ne palpebla
- pereema: je certa momento, la servo estas for: vojaĝo kiun vi ne povas partopreni, estas definitive perdita
- malsama: neniam, neniu servo estas identa
- servo ĉiam estas ligita al servo-liveranto
- oni multe pli transdonas informojn pri malbonaj servoj. Malbonaj servoj postulas tre fortan kontraŭpezon de bonaj spertoj.

| | avantaĝoj | malavantaĝoj | konkretaj agadoj |
|---|---|---|---|
| ne palpebla, ne materia | | ne enspeziga | |
| kontakto kliento/ liveranto | timiga aspekto<br>maljunema etoso | | modernigo |
| partopreno de kliento | | | |

*(Supra ekzerco estis nefinita, kaj do iam refarenda)*

**Kion ni faras ?**

*Ĉiam estas centra, baza servo kaj kromaj servoj*
*kromaj servoj havu saman kvaliton kiel la bazaj servoj, se ne: forigu ilin !*

Ekzemplo: Baza servo de flugkompanio estas aera transporto. Kromaj servoj povas esti restoracio, revuo, aldona transporto...

La baza servo estas la koro kaj la kredo de nia movado. Ni supozas ke la ekstera mondo transprenos tiun kredon. Ni povas difini niajn konkurantojn nur se ni sukcesas klare difini la koron de nia movado. (*El la posta diskuto evidentiĝis ke mankas unueco pri la koro: ĉu komunikado, paco, lingvo, diskriminacio...? Do ankaŭ tion ni devus klare difini antaŭ ol entrepreni novajn kampanjojn por la ekstera mondo!*).

<u>Kio estas merkatado ?</u> (*marketing = "market getting" = kiel kapti la merkaton*)

Kreado, maksimuma ekspluatado kaj konservado de daŭra, profitdona rilato inter entrepreno kaj aĉetantaro.

| | |
|---|---|
| <u>kreado</u> ----- | esploro: kion ni havas; kion oni deziras de ni |
| <u>maksimuma ekspluatado</u> --- | diskonigo: reklamoj, afiŝoj, komunikiloj |
| kaj <u>konservo</u> de <u>daŭra</u> ----- | serĉi novajn adeptojn kostas multe pli ol la konservado |
| <u>profitdona</u> rilato inter entrepreno kaj aĉetantaro | t.e. kiam ĉiu sentas sin bona |

***teorio (pri kio ni atentu ?) + praktika sperto + normala prudento***

***= bona merkatado***



<u>Kiel plibonigi ?</u>

**"Marketad-miksaĵo"** konsistas el 4 eroj, kies graveco fluktuas:

| | |
|---|---|
| <u>prestatie/faritaĵo</u> | = lingvo kiel komunikilo; ĝenerale: kion oni proponas; propraj ecoj de la produkto; ĉu ni havas bonegan produkton ? |
| <u>promotie/disvastigo</u> | = kiel ni akceptas novulojn; reklam- kaj disvastigmetodoj; nia "imago" estas malbona: maljuna, malrapida "rotacio" de membraro |
| <u>prijs/prezo</u> | = kotizoj, veturkostoj, tempo-uzo; ne nepre malmultekosta: bona produkto valoras bonan prezon |
| <u>plaats/loko</u> | = ĉu ni estas bone atingeblaj (troveblaj) ? |

Car "la produkto" Esperanto estas bonega, ni devos pli atenti pri la aliaj elementoj: disvastigo, loko, prezo. Por plibonigi nian varbadon ni devas esti bonaj pri ĉiuj kvar elementoj. Sed nepras elekti nur kelkajn konkretajn celojn kaj fokusi la atenton je tiuj.

<u>Evoluo de la tendencoj pri Merkatado.</u>

| | |
|---|---|
| 1. PETO | origine peto estis pli granda; kvalito de oferto ne gravis<br>Por E' tiu fazo jam pasis: oferto ja ekzistas |
| 2. DISTRIBUO | kie, kiel atingebla (ekapero de vendej-ĉenoj) |
| 3. MERKAT-DIVIDO | al kiu parto de la merkato (= de la loĝantaro) ni direktas nin ?<br>de kie venas niaj membroj ? |
| 4. KLIENT-DIREKTITA | kion deziras la kliento = kiel kondutas E-interesito ? |
| **** | Rimarko pri "Esperanto, je vraagt maar":<br>Ĉiuj demandoj estas negativaj; ni kvazaŭ antaŭvidas ke la homoj havas antaŭjuĝojn kaj anticipe defendas nin. |
| 5. RILAT-CELA MERKATADO | ni plenumas la deziron de la kliento; kreskiga interrilato<br>plej gravas: buŝa reklamo (pozitive kaj negative !)<br>ni demandu kiel novaj kursanoj kontaktas nin<br>rimarko de RR:<br>Post la kunveno Kortrejka reprezentanto promesis prepari demandilon por la kurso kiu ekas venontan semajnon. Aliaj konataj kursgvidantoj ricevos ekzempleron de la demandilo. |

<u>Formoj de diskonigo</u>:

- REKLAMO: konscie nepersona, sed amase aplikebla; tial plej konvena por produktoj sed multe malpli por servoj kaj certe plej nekonvena por asocioj.

- PUBLIKECO: kion oni diras kaj pensas pri ni; ĝi devigas nin efike labori, ĉar publiko ne tiom influeblas per bonaj argumentoj sed per veraj demonstracioj de efika servo.

- HOMAJ RILATOJ: kun politikistoj, gazetaro kaj ĝenerale kun homoj kiuj havas influon sur la opinion de multaj aliaj.

- AVANTAĜOJ: avantaĝaj vendoj apenaŭ uzeblas en asocioj.

- PERSONA KONVINKIGO: la buŝa reklamo plej malmultekostas sed plej danĝeras; unu malbona sperto rapide disvastiĝos. Gravas eikece varbi en propra ĉirkaŭaĵo. Eble tio pli gravas ol la ekstera aspekto de niaj informiloj.

- PROSERVO (produkto + servo): gravas ke la personoj malantaŭ la kurtenoj diras la samon kiel la varbantoj. Necesas unue trovi harmonion interne de movado antaŭ ol iri eksteren.

Merkatad-ekzekutiloj

Ĉiuj rigardas el alia vidpunkto: al sama objekto iu diros "estas bela", alia diros "estas multekosta". Indas esplori la diversajn bezonojn de ĉiu homo rilate al la fenomeno Esperanto, por poste pli konscie elekti niajn armgumentojn.

**** Amway-sistemo (ankaŭ proponita de VVDK):
Ni preparu kasedo(j)n kun informojn pri Esperanto (ekzemple kompilado de interesaj radioprogramoj pri E.). Ĉiu aktivulo disponu pri tia kasedo, kiun li povas transdoni al iu persono, kun peto hejme aŭskulti ĝin. Post unu semajno, li ree petas la kasedon kaj demandas pri la reagoj. Avantaĝoj: simpla, taŭga, malmultekosta, tempoŝpara informilo, kun granda reag-certeco.

Maslow faris piramidan bildon de la diversaj niveloj de homaj bezonoj. Ĉe la bazo troviĝas la plej fortaj bezonoj. Apenaŭ eblas kontentigi pli supran nivelon kiam restas manko de kontentigo en pli suba nivelo.

memrealigo
a p r e z a d o
a k c e p t i ĝ o
s e k u r e c o
f i z i o l o g i a j   b e z o n o j  → konforto: unu lingvo ...

Ni provas traduki tiun piramidon de Maslow per jena listo de konkretaj bezonoj por meza konsumanto. La ciferojn de tiu listo vi retrovos supre sur la tabelo en paĝo 7.

1. Sekureco
2. Aparteno al socia unuo
3. Facileco
4. Progreso
5. Novajoj
6. Ĝuo
7. Ekskluziveco
8. Avantaĝo



Nun necesas fari liston de ĉio, kion ni povas oferti al niaj klientoj kaj esplori kiamaniere ni povas kontentigi unu aŭ plurajn el tiuj supre menciitaj bezonoj de la klientoj.
*Poste vi trovos la rezulton de la ekzerco en nia kunveno. Sed ĝi ne estis finita. La ĉeestintoj havis ankoraŭ multajn argumentojn favore al E°, kiuj ne estis notitaj sur la listo. La posta paŝo - kiun ni ankaŭ ne faris - estas formuli frazon pri ĉiu kruceto de la listo sur la sekva paĝo. Finfine fariĝas tute klare ke ne eblas uzi ĉiujn argumentojn, sed ke ni elektu por ĉiu individuo aŭ grupo nur kelkajn argumentojn por kiuj li sentas bezonon.*

La konkludo de tiu ĉi ekzerco estas ke ni disponas pri ege longa listo de atutoj. Defenda konduto de esperantistoj estas de sensenca.

*Ankoraŭ farenda tasko estas esplori ĉu niaj argumentoj veras, kiuj estas niaj malfortaj punktoj kaj kiuj estas la fortaj punktoj de niaj konkurantoj. Per tia ekzerco eblas fari faldfolion, redaktita en "vi"-formo.*

Eltrovo de fortoj kaj malfortoj de nia aktuala asocio

Fortoj
motivado
unu sola asocio (Flandrio)
regulaj kunvenoj
fiksa adreso
kontinueco
oficejo disponebla dum laborhoroj
revuo
subteno de kluboj
kontaktoj kun aliaj E-asocioj
libroservo
kunlaboro inter grupoj
alirebla por ĉiuj

Malfortoj
manko de kontaktoj NL-Fl; Fl-Valonio
3 asocioj (NL)
internaj kvereloj, rivalecoj
malkvalito de kursoj kaj instruistoj
manko de kunordigo
perdo de kursanoj
malbona akcepto de novuloj, pro nesufiĉa lingvokono (propono: doni "baptopatron" al ĉiu novulo)
alta "enirsojlo" al movado
tro malforta strukturo
agado tro bazita sur individuoj

Eblecoj, ŝancoj
kunlaboro NL/Fl, Fl/Wall, en EK (1992)
internaciigo
internacia komerco: produktrespondeco (gravaj atentigoj en malmultaj lingvoj + Esperanto)
lernado de aliaj lingvoj
pli bona kunlaboro kun aliaj kulturaj asocioj
helpo al evolulandoj (anstataŭigo de uzo de eks-koloniista lingvo)
enkonduko ĉe internaciaj organizoj (Bahai, Oomoto, Mondfederalistoj...)
"akompano" de novuloj
kunordigo de agadoj (por kapti la atenton kiel grupo)
eniri oficialan instruadon
kontaktoj kun gazetaro
utiligi personajn rilatojn

Danĝeroj
maljuniĝo (vergrijzing)
financoj
manko de tempo (urĝeco)
malbona bildo ĉe eksteruloj
helpo al sia lingvo de gravaj landoj
malsubteno de tradukistoj

| | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| interna ideo | | x | | | | x | | |
| disvastigita en la tuta mondo | | | | | | x | | x |
| plifaciligas lernadon de aliaj lingvoj | | | x | x | | | | x |
| kostoŝpara | | | | | | x | | x |
| neŭtrala | x | x | | x | | | | |
| internacia | x | x | x | x | | | | x |
| evoluigo de intelekto | | | | x | | | x | x |
| amikeco | x | x | | | | | x | x |
| strukturo | x | x | x | x | x | x | x | x |
| fiksa, propra kunvenejo | | | x | | | | | x |
| poŝtmarkkolektado | | | x | | | x | | x |
| radioprogramoj | | x | | x | | x | x | |
| kulturcentroj | | | | x | x | x | x | |
| biblioteko (Kortrijk) | | | | | | | x | |
| revuoj | | x | x | | | | | |
| fiksa kurssistemo (3) | | | | x | x | | x | x |
| korespondado | | x | | | | | x | x |
| lando kupola organizo | | x | x | x | | | | |
| vojo al aliaj kulturoj | | x | | | | | x | |
| ekskursoj | | | | | | x | x | x |
| eblecoj por estonteco | x | x | x | x | x | x | x | x |
| simpleco | x | | x | | | | | x |
| DLT | | | x | x | x | | | |
| internacia reprezentaro | x | | | x | | | | x |
| profundigas konon de propra lingvo | | | | | | | x | x |
| nova internacia komunumo | x | x | | | x | | | |
| internacia libroklubo | | | x | | | | x | x |
| pac-mesaĝo | | x | | | | | | x |
| vojaĝeblecoj | | | | | | | x | x |
| kongresoj | | x | | | | | | x |
| jarlibro | | | x | | | x | | x |
| fakaj asocioj | | x | | x | | | | x |
| parlamentanoj | | | | x | | | | x |
| fiksaj kunlaborantoj | | x | | | | | x | x |
| volontulaj kunlaborantoj | | | x | | | | x | |



Elektitaj eblecoj

1. kunordigitaj agadoj de ĉiuj grupoj kune
2. eniri lernejojn (dumtaga instruado)
3. rilatoj kun gazetaro
4. uzi rilatojn
5. kunlaboro kun aliaj kulturaj asocioj
6. partopreno al borsoj
7. 1992
8. evolulandoj
9. internaciaj organizoj
10. respondeco
11. informado
12. utiligi manifestaciojn - interŝanĝojn

Konkretaj iniciatoj

Sur p. 9 + 10 vi povas legi resuman priskribon de 12 konkretaj projektoj kiun ni povus ev. realigi en kunlaboro kun diversaj grupoj. Por malkovri la preferon, oni organizis duŝtupan elekton. Unue ĉiu ĉestanto menciis ĉu projekto ŝajnas al li interesa aŭ ne. Jen la rezulto(unue projekto, poste nombro da voĉoj):
1 (17),2 (5),3 (13),4 (9),5 (10),6 (17),9 (18),10 (2), 12 (9).
Poste ĉiu ĉeestanto elektis 1 projekton el ĉiuj, kiuj havis pli ol 8 poentoj:
1 (2), 4 (2), 5 (1), 6 (9), 9 (1), 12 (4)

Evidentiĝis ke la ĉeestantaro havis klaran preferon por la projekto "Komunikado en la Eŭropa Komunumo".

El la FINA FORUMO ni notis ankoraŭ kelkajn rimarkindajn konstatojn.

- "Vi planas grandan projekton por movado, al kiu interne mankas stabileco. Necesas unue interne fari "grandan purigon"!
- "Unua tia studotago provokas frustracion. Nia tasko ja estas malkovri mankojn."
- La programo de la tago estis nefinita. Necesas refari multon, sed ne la tuton. Ni provu apliki kion ni lernis sur konkreta projekto. Tiel laborante interne ni preparas nin por sukcese montri nin eksteren.
- Ni elektis 1 projekton, sed tio ne signifas ke ni entombigu la aliajn. Ĉiuj estas valoraj. Kelkaj projektoj efeftiviĝos loke aŭ per malgranda laborgrupo.
- Preskaŭ ĉiuj ĉeestintoj konsentis denove kunveni por daŭrigi la laboron. Ĉi-rilate jen jam konkreta propono:

Ni invitas vin ĉiujn por ĉeesti novan kunvenon je sabato, 3.12.1988 inter la 10a kaj 17a horo, sub gvidado de Paul Peeraerts, por pritrakti jenajn demandojn:

Kiu estas la KORO de niaj aktivecoj (ĉu lingvo, komunikado, paco, diskriminacio...)?
Kiuj estas niaj kromaj aktivecoj? Kiuj aktviecoj eventuale malaperu?
Kiu(j) finfine estu nia(j) celgrupo(j)?

## SKIZA SUPERRIGARDO DE KELKAJ PROJEKTOJ

1. LINGVO-LIBROBORSO EN LEUVEN (*Vidu aldona dokumento*).

Por atentigi la publikon pri E°, por pruvi ke E° ne volas anstataŭi sed protekti naciajn/etnajn lingvojn kaj por altiri la atenton de la ekstera publiko pri E°, S-ro Vanden Bempt ellaboris projekton pri tia borso. Por realigi ĝin necesas - certe dum la borso mem - kunlaboro de multaj esperantistoj ekster Leuven.

2. EUROPALIA 1989 - JAPANIO (*Vidu aldona letero*).

Europalia 1989 temas pri Japanio. Ekzistas realaj kontaktproblemoj kun tiu lando, pro lingvaj sed ankaŭ pro kulturaj diferencoj. La esperantistoj delonge havas bonajn kontaktojn kun tiu lando. Raymond Wylleman proponas ke ni eluzu niajn eblecojn por montri la eblecojn de Esperanto en la fora Oriento, sed ankaŭ por varbi reklamojn por la Europalia-aranĝoj.

3. TURISMO.

Tiu temo havas du facetojn:
a) Esperantistoj, kiuj volas partopreni E°-aranĝojn kelkfoje troviĝas antaŭ komplikaj malfacilaĵoj: mendi, pagi kaj administri por la Esperanto aranĝo en iu loko, por la vojaĝo en alia, por eventuala dumvoja tranoktado en tria loko kaj por la vizo en kvara. Se iu persono - kiel Kiki Tytgat perfekte faris por la UK en Varsovio - povus centralizi ĉion, kunlabore kun vojaĝ-entrepreno, tio multe pli allogus.
b) Malgraŭ bonegaj servoj de vojaĝoficejoj, Esperanto ankoraŭ povas liveri unikajn servojn ankaŭ al neesperantistoj, kiuj volas fari vojaĝon ekster la kutima kadro. Mi citu kelkajn eblecojn en kiu la delegita reto povas multon kontribui: vojaĝojn en neturismajn regionojn; vojaĝojn en Orient-Eŭropo, Azio, Sud-Ameriko; luo de ĉambroj ĉe privatuloj; luo de apartementoj; mendo de mezklasaj hotelĉambroj ktp.
Iwona Kocieba pretas pristudi la eblecojn en tiu kampo. Sed se ni kune decidus meti la akcenton je turismo, tiam prefere ĉiuj grupoj samtempe montru tiujn eblecojn.

4. INTERNACIA MEDICINISTA ESPERANTO-KONFERENCO.

De la 25a ĝis la 29a de julio 1989 okazos en la universitato de Kortrijk supre menciita konferenco. S-ro De Backer tial alvokas ĉiujn grupojn en Flandrio por organizi informkampanjon pri Esperanto en ĉiuj medicinaj medioj: ĉe medicinistoj sed ankaŭ ĉe flegistoj, en klinikoj, laboratorioj, fabrikoj de medikamentoj ktp.

5. SCIENCAJ, PEDAGOGIAJ KAJ KOMERCAJ INTERŜANĜOJ KUN LA ORIENTO.

S-ro Van de Kieboom opinias ke ni sukcesos konvinki homojn kun gvidaj pozicioj en nia socio pri la eblecoj de Esperanto nur post kiam ni akiras kelkajn konkretajn rezultojn per la uzo de Esperanto: ekz. komercaj kontraktoj, interŝanĝoj de studentoj, interŝanĝoj de teknikaj scioj kun landoj, kiuj nun malfermiĝas en Orient-Eŭropo kaj Azio.



S-ro Van de Kieboom havas multajn rilatojn kun influhavaj personoj. Sed li demandas ke la kluboj okupiĝu malpli pri distraj aranĝoj kaj dediĉu pli da tempo por realigi tiajn kontaktojn.

6. KOMUNIKADO EN LA EŬROPA KOMUNUMO (*Vidu aldona dokumento*).

Por pruvi ke Esperanto povas ludi rolon en la realigo de la interna merkato en 1992, S-ro Erasmus alvokas al komuna agado en ĉiuj 12 landoj de la Komunumo. Per bone organizita kunlaboro, li antaŭvidas atingi ke samtempe komenciĝos eksperimento en diverslandaj mezlernejoj pri instruado de Esperanto (90-91). En la aŭtuno de 1991 devus starti televida Esperanto-kurso en ĉiuj landoj de la Komunumo.

7. KOMUNIKADO EN LA EŬROPA KOMUNUMO 2.

Tiu ĉi propono tre similas al la antaŭa. S-ro Hanson proponis serĉi samfakajn altlernejojn aŭ universitatajn fakultatojn, kiuj pretas eksperimente organizi rapidkurson. Tuj post la fino de tia kurso okazu renkontiĝo, kie la lernintoj povas - en ferio etoso - interŝanĝi sciojn kaj konojn.

8. AKAPUNKTURO EN ĈINIO.

Ĉinio organizas kursojn pri akupunkturo, kun Esperanto kiel instru-lingvo. Tio estus alloga propagandilo ĉe kuracistoj.

9. JUNULKONGRESO EN KERKRADE - JULIO 89.

Venos kelkcento da junuloj el la tuta mondo. Ideala demonstracio de la funkcio de E°. Ideala momento por atentigi komunikilojn pri tio.

10. PILGRIMADO ĈE RIVERO IJZER.

Partoprenas multe da eksterlandanoj, kiuj precipe interesiĝas pri diskriminacio de malgrandaj lingvoj. Bonega momento por montri la rolon de Esperanto kiel protektilo de naciaj lingvoj.

11. BORSO PRI TURISMO.

Ni havu tie informan standon, kie ni emfazu la rolon de E° por turisto.

12. INFORMAJ PRELEGOJ EN ALIAJ ASOCIOJ.

Naciaj estraroj de la grandaj fondusoj preparas turneajn prelegojn. Ni metu la kapojn kune por eluzi niajn personajn rilatojn kaj por elekti plej bonajn prelegantojn.

## Superrigardo de projektoj de Walter Van den Kieboom

### Invito de aziaj komercistoj al Belgio post UK R'dam

Ne sukcesis. Kontaktoj tro malfruaj. Ne estis reago el Ĉinio kaj Koreio. Ni nur poste eksciis pri internaj problemoj en Japanio (Oomoto).

### Vizito de ĉina Esperantistoj post la UK / Komerco kun Ĉinio

Shen Chenru vizitis plurajn entreprenojn. Estis akceptita de provincaj instancoj. Ligis kontaktojn kun estro de investkompanio (Prominvest?)

... (instruisto pri lingvoj) prelegis en Oostende. Vizitis INCOBE (firmao de WVDK). Havas rilatojn kun ĉinaj esperantistoj kiuj deziras internacie komerci.

... prelegis franclingve en Belgio. Invitita de ASLK (ŝtata sparkaso). Estis dum longa tempo komerca respondeculo de ĉina ambasadejo. Nun estras instituton en Ĉinio kie franclingvanoj povas fari staĝon. ASLK-prelegoj ne estis bone organizitaj (verŝajne lastmomenta aranĝo; ASLK ankoraŭ ne havas multe da spertoj rilate al "porkomercistaj" prelegoj.

### Europalia (oktobro-novembro 1989) : granda ekspoziciaro; temo: Japanio

Kunlaboro kun japanaj esperantistoj malfacile pro jam menciita problemo. Belga ambasadejo en junio/julio ankoraŭ nenion sciis pri Europalia. "Honda" havas kvazaŭ monopolon pri la aranĝoj en Belgio (estis la unua japana firmao en Belgio) sed aliaj japanaj entreprenoj ankaŭ deziras organizi ion.

Plej alloge estas organizi ion en Gent (granda urbo, el kultura kaj ekonomia vidpunkto; ekzistanta kaj bone funkcianta E-grupo). WVDK nun havas relative bonajn kontaktojn kun urbestraro, sed verŝajne jam estas tro malfrue por realigi ion.

### Medicinista kongreso en Kortrijk (juli 89)- kursoj pri akupunkturo

Shen Chenru konas eblecojn por malmultekoste organizi kursojn pri akupunkturo en Ĉinio, kun Esperanto kiel intru-lingvo. Tio estus interesa propagandilo ĉe kuracistoj, samtempe kun la kongreso en Kortrijk.

### Allogo de elstaraj personoj al E-movado

WVDK havas multajn altnivelajn rilatojn. Tamen, tiu personoj ne sentos sin hejme en la kutimaj (ofte fuŝaj) E-lernejoj, nek en la nunaj E-kluboj. Tial li ŝatus organizi E-kurson en bonfamaj institutoj (ekz. Vormingsinstituut). Li estas sufiĉe enfluhava por organizi la kurson, sed mankas certeco pri taŭga instruisto.

Eniro de kuracistoj, entreprenestroj, inĝenieroj... povas plivigligi nian movadon (nepre bezonata !)



## GRAVAJ SCIIGOJ

- La vizito de Kimie Markarian (kun Soroban-demonstacio) NE povos okazi en novembro. Ŝi supozeble faros rondvojaĝon en nia lando inter la 22a ĝis la 29a de aprilo 1989!

- Ĉi kune vi trovas detalan raporton pri la kunsido de la 8a de oktobro. Tiam la laboro ne estis finita. Ni invitas la reprezentantojn de la lokaj grupoj por daŭrigi ĝin je la 3a de decembro inter la 10a kaj 17a horoj en la Esperanto-domo en Antwerpen. Ĉi-foje Paul Peeraerts gvidos la kunvenon pri la temoj: kiu estas nia ĉefa celo; kiuj estas niaj kromaj aktivecoj; kiuj estu niaj celgrupoj.
Principe ni planas poste ankoraŭ okazigi tiajn kunvenojn ĉiun duan monaton.

- UEA sendis al ni sian Strategian Planon por la Dua Jarcento kaj petis niajn komentojn. Temas pri 15-paĝa tre interesa dokumento. Ĝi indas vastan pridiskutadon. La kompleta teksto aperis en la revuo Esperanto de oktobro. Ni eĉ pretas sendi kopion al interesatoj je simpla peto. Je la 18a de novembro S-ro Roy McCoy (USONO) de la centra oficejo de UEA gvidos debaton pri tiu temo en la klubejo de La Verda Stelo. Grégoire Maertens partoprenos ĝin. Vi ĉiuj estas bonvenaj. Ni atendas viajn reagojn ĝis la 1a de decembro!

- Post la sukceso de la Jubilea Jaro, la informpetoj estis ĉi-jare surprize malmultaj. Feliĉe, post televidelsendo en Veronika pri UK/Rotterdam kaj pluraj artikoloj en la flandra gazetaro, subite alvenis 23 informpetoj en la centro. Post tre sukcesa kongreso en Gent, kun eĥoj en ĉiuj gazetoj, La Progreso havis rekordan nombron da kursanoj: 37. Tio ja pruvas, ke laboro por la gazetara servo estas ankoraŭ la plej efika aktiveco. Tamen daŭre mankas kunlaborantoj en Flandrio!

## NOVA PRESMAŜINO EN NIA CENTRO.

Jam antaŭ duona jaro evidentiĝis ke la grafikaj laboroj en la centro malpliiĝas, ĉefe pro malkresko de la laboroj por UEA. Ni antaŭvidis la eblecon de deficito kaj tiu ebleco nun fariĝis certeco. Evidente, tio daŭre okupis la financan komisionon. Dum monatoj ni - kun la helpo de teknikaj kaj financaj konsiloj de kontataj esperantistoj - esploris plej diversajn solvojn. Ĉefa ebleco montriĝis la aĉeto de bonkvalita presmaŝino. Sed temas pri investo de 1 200 000 BEF. Car tiel ni povos realigi konsiderindajn ŝparojn sed samtempe estos pli konkurenckapablaj por presaĵoj, ni tamen faris la aĉeton. La maŝino jam ekfunkcios komence de novembro. Samtempe ni kontaktis esperantistajn kaj neesperantistajn organizaĵojn por trovi novajn klientojn. Jam realiĝis kelkaj novaj mendoj kaj oni pritraktas promesplenajn ofertopetojn. Estas ne plu ebla por solvi la deficiton de 1988. Sed ni povas denove, kun granda fido, atendi kontentigajn rezultojn en la venonta jaro.
Vi povas ankaŭ kontribui al tiu sukcesa estonto en du manieroj:
1) per ĝiro en la Verdan Konton: tiel vi malhelpos ke ni devos pruntepreni monon de banko je interezo de 11 %;
2) se vi havas rolon en alia organizaĵo vi povas instigi tiujn homojn por peti prezoferton por grafikaj laboroj en Antwerpen; niaj lastmonataj kontaktoj kun aliaj organizaĵoj montris ke ni havas nun tre interesajn prezojn.

FEL ESTRARO

## RAPORTO PRI LA KUNSIDO DE 880910

Ceestas: Ivo Durwael, Paul Peeraerts, Edward Symoens, Jos Vandebergh

1. Financoj: Zorgoplenaj restas la grafikaj laboroj. Laboroj por UEA forte regresis; laboroj por ne-esperantistaj organizaĵoj iom falis: laboroj por esperantistaj organizaĵoj restis samaj. Tre pozitivaj estas la rezultoj de "Stafeto"-libroj kaj la libroservo generale. Car certe ne estos eble ĝis la jarfino trovi sufiĉe da novaj klientoj por amortizi la deficiton kaŭzitan de UEA, ni devos kalkuli pri malgajno en 1988.

2. Presado: Nova presmaŝino estis aĉetita. Ĝi estos liverita meze de novembro kaj esperebla produktopreta fine de la monato. ID sukcesis kapti kelkajn preslaborojn ĉe kulturaj asocioj.

3. APE: ID informas, ke Georges Sossois iĝis prezidanto de nia frata asocio APE.

4. Turismo: FEL reorganizas sian turisman servon sub la gvido de Iwona Kocieba. Estos organizita grupvojaĝo al la UK en Brajtono. Partoprenontoj de la UK povos kiel kutime aliĝi pere de FEL. Krome la turisma servo ekde nun povos helpi al individuoj kiuj spertas vojaĝ- aŭ vizajn problemojn. Sufiĉas kontakti la centron en Antverpeno, kiu pludirektos la peton al la ĝusta homo.

5. Kongresoj: Ne estas jam novaĵoj pri la financa rezulto de la kongreso en Gento.
Por la venontjara kongreso, leviĝas la demando, ĉu eblus kunlabori kun la Eŭropa asocio de instruistoj, kiu kongresos en Nijmegen. Ankaŭ kunlaboro kun la Nederlanda kongreso ŝajnas oportuna. ES sendos pri tio.

6. Kriterioj pri kursoj: Kvankam delonge la bezono estas sentata, mankas kriterioj pri la nivelo kaj enhavo de Esperanto-kursoj, same kiel pri la akcepto de novaj Esperanto-instruistoj. Kiel unua paŝo estas decidite, ke intensaj kursoj povas esti rekonitaj de FEL fare de la komisiono pri instruado sub la gvido de Petro de Smedt. Rekonitaj intensaj kursoj ĝuos specialajn servojn kiel anoncoj en Esperanto-Panorama, malmultekostaj afiŝoj, ktp. Rilate la rekonon de novaj Esperanto-instruistoj, ES havigos la ĉi-teman ILEI-dosieron.

7. Strategia plano de FEL: La estrarkunsido de la 3a de decembro ne okazos, sed anstataŭe estos kunsido por difini nian strategion. Tiu ĉi kunsido, kiu okazos de la 10a ĝis la 17a horo en la Esperanto-centro, estos iasence daŭrigo de la strategia kunsido de oktobro. La temoj estos "La *koro* de nia movado" kaj "Nia(j) celgrupo(j)". Vidu invitilon pri tio aliloke en tiu ĉi revuo. PP krome sendos kelkajn personajn invitleterojn.

8. Strategia plano de UEA: ID surpaperigos kelkajn komentojn de la estraranoj.

9. Limburga tago: La 19an de aŭgusto 1988 okazos la Limburga tago en Beringen.



10. Donaca sistemo: Ŝajne ekestis iu neklaraĵo pri la donaca sistemo. Sur la formularo sendita al ĉiuj membroj ne estis menciita ke kontraŭ donaco de 1500 fr. oni ricevas senpagan membrecon de FEL kaj UEA. Tiu ebleco restas. La aliaj eblecoj menciitaj en la formularo estas kromaj eblecoj ĉefe interesaj por tiuj personoj kiuj abonas multajn revuojn. Ni tamen denove klare emfazu, ke tiuj donacoj okazu en 1989, ĉar pro malrapideco de la administracio, FEL ne sukcesis ricevi permeson por 1988.

11. Venonta kunsido: 3a de decembro.

---

GRUPVOJAĜO AL LA UK EN BRAJTONO

La abonantoj de "Esperanto" kaj "Monato" jam ricevis aliĝilon pri la Universala Kongreso en Brajtono. Same kiel dum la pasintaj jaroj, membroj de FEL povas havigi sian aliĝilon al FEL kiu plusendos al UEA. Same pagoj povas okazi pere de la FEL-kontoj. Personoj kiuj aliĝas pere de FEL aŭtomate ricevos ĉiujn necesajn informojn pri la grupvojaĝo de FEL per aŭtobusoj kaj pramŝipo. Ĝi supozeble ekos en ĉiuj grandaj urboj de Flandrio (aŭ eĉ ekster ĝi, se estas sufiĉaj aliĝoj de aliaj lokoj).

PETICIO DE AMNESTY INTERNATIONAL

Vi sendube trovis ekzempleron de la peticio pri Homaj Rajtoj en la revuo Esperanto. Tiu peticio havigas al ni eblecon por subteni la respektadon de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Sed samtempe ĝi donas al ni eblecon por eliri nian rondon. La homaj rajtoj ĝuas ĝenerale respekton kaj aprobon ĉe la publiko en nia lando. Sed la plimulto de la homoj surpriziĝos ke tiu peticio ekzistas en Esperanto. Per nia kunlaboro en la kolekto de subskriboj, ni profitos de la prestiĝo de A.I. Sed necesas agadi fulmrapide: jam je la 10a de decembro oni transdonos la peticion al UNO. Do necesas forsendi la formularojn plej laste komence de decembro. Ne restas tempo por peti pliajn foliojn, sed jes eblas fotokopii ilin aŭ aldoni aliajn foliojn al la presita teksto. Ni sugestas al lokaj aktivuloj ne nur mem subskribi sed kolekti subskribojn en sia ĉirkaŭaĵo: laborejo, aliaj klubejoj, paroĥaj kaj/aŭ kulturaj centroj, dum kunvenoj de aliaj homgrupoj ktp.
Sukceson!

# NIA PROPRA BABELA TURO

Post la kongreso en Gent, la Progreso akiris rekordan nombron da gekursaonoj: 37. En Kortrijk, 40 personaj ĉeestis informan kunvenon. Alex Humet havas 17 enskribitoj en la urba kurso kaj 14 en Burcht. En Lokeren pasis kurso kies ĉiuj partoprenintoj aperis en Rotterdam kaj daŭre estas pioniroj en praktika uzado de Esperanto. Leuven kaj Hasselt jam dum jaroj gvidas seninterrompe unu kurson post la alia, ktp.ktp. Ĉu tiuj rezultoj ne sufiĉas por esti kontentaj pri nia agado? Jes, tiuj rezultoj estas tre kuraĝigaj. Pro tiaj rezultoj nia movado devus konsiderinde kreski. Se ĝi ne pli rapide kreskis ni plue esploru eblajn kialojn.

Estas tute certe ke nuntempe pli malfacilas por akiri atenton de la publiko. Antaŭ 20 jaroj mi rememoras ke unu bona artikolo sufiĉis por provoki ĝis 50 reagojn. Ĉi jare la gazetara servo nombris ĝis aŭgusto 80 eltranĉaĵojn per kiu ni eble akiris centon da informpetoj! Ne helpas nin por lamenti pri tio. Tiu konstato simple devigas nin por pli bone organiziĝi. Nia malforta punkto estas ja la konservado de novuloj. Por iel analizi tion, ni provu enrampi en la haŭton de nov-varbita entuziasmulo. Iun tagon li imponiĝis ĉar Esperantisto parolis pri 20 milionoj da adeptoj. La postan tagon alia Esperantisto rakontas ke tio estas nur fanfaronaĵo, kiun neniu kredas. Unua ekdubo! Lin ankaŭ allogis la belaj vortoj pri internacia amikeco en varma etoso. Kaj je unua vizito al loka grupo li aŭdas rasismajn esprimojn pri la gastlaboristojn aŭ blasfemojn pri "tiuj stultuloj de UEA". Strange. Ekzistas neta breĉo inter niaj faldfolioj kaj informaj prelegoj kaj nia apero antaŭ la publiko. Dum la laborkunsido de la 8a de oktobro mi estis vere ŝokita pri la manko de memfido de la partoprenantoj. Svarmis esprimoj, kiuj komenciĝis per la vortoj "ĉu, eble, se, mi dubas ke, jes sed..." Krome Mirjam Smets pentris por mi jenan bildon pri la kunveno: "grupo da individuoj, kiuj ĉiuj ŝatas iri sian propran vojon". Ni estas kvazaŭ skipo da volontuloj, kiuj volas konstrui belan domon, en kiu regas paco, amikeco kaj harmonio. Sed ni ĉiuj venas kun niaj propraj konstrumaterialoj kaj labormetodoj. Ni arde laboras, sed la domo apenaŭ progresas, ĉar daŭre iu neniigas la laborojn de la alia. Ni eĉ forgesis interkonsenti kiu finfine loĝos en la domo! Ŝajnas al mi tre grave nun agordi la ideojn pri nia fincelo, pri nia labormetodo kaj pri la sinsekvo de la laboroj. En 86 ni kreis almenaŭ uniformecon en la ekstera aspekto per nia domstilo. Sed por povi reciproke subteni kaj plifortigi la agadon unu de la alia necesas kunordigo inter ĉiuj aktivuloj. Tial mi forte esperas je partopreno de almenaŭ 1 reprezentanto de ĉiu aktiva grupo dum la kunvenoj kiun ni planas principe ĉiun duan monaton. Ĉeno ja nur estas tiel forta kiel sia plej malforta ĉenero.

Ivo Durwael